Christian Felix Weiße,

# La kontenteco

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Trankvile, milde sentas mi
La vivoĝojojn sen ĉagreno.
Senĝene lumas tie ĉi
Bonvenon la mateno.

Kontentas, gajas mia kor',
Ĝi daŭre batas melodie.
Agrabla estas la dolor',
Se ploras mi pasie.

Priridas mi ja ĉiujn ĉi
Heroojn, sangverŝantojn, princojn.
Pri mia dom' kontentas mi,
Bezonas ne provincojn.

Ja furiozas kontraŭ si
La grandsinjoroj kvazaŭ-diaj.
Sed ĉu bezonas ili pli
Da spac' en tomboj siaj?

Christian Felix Weiße,

# Die Zufriedenheit

Wie sanft, wie ruhig fühl' ich hier
Des Lebens Freuden ohne Sorgen!
Und sonder Ahnung leuchtet mir
Willkommen jeder Morgen.

Mein frohes, mein zufried'nes Herz
Tanzt nach der Melodie der Haine,
Und angenehm ist selbst mein Schmerz,
Wenn ich vor Liebe weine.

Wie sehr lach' ich die Großen aus,
Die Blutvergießer, Helden, Prinzen!
Denn mich beglückt ein kleines Haus,
Sie nicht einmal Provinzen.

Wie wüten sie nicht wider sich,
Die göttergleichen Herr'n der Erden!
Doch brauchen sie mehr Raum als ich,
Wenn sie begraben werden?

*Traduko de la Germana poemo "Die Zufriedenheit" de* CHRISTIAN FELIX WEISSE *(∗1726-01-28 – †1804-12-16) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 2014-08.*

*Arg-1086-2188 (2014-08-27 13:47:43)*

*Tiu ĉi poemo estas trovebla ankaŭ en* http://www.gedichte-lyrik-poesie.de/Weisse_Die_Zufriedenheit/index.htm.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* CHRISTIAN FELIX WEISSE *(∗1726-01-28 – †1804-12-16).*

*Arg-1086-2187 (2014-08-27 13:54:49)*

*Pri la poeto vidu la vikipediejon* http://de.wikipedia.org/wiki/Christian_Felix_Wei%C3%9Fe. *Poemo de li troviĝas en* http://www.zeno.org/Literatur/M/Wei%C3%9Fe,+Christian+Felix. *La poemo troviĝas ankaŭ en* http://www.gedichte-lyrik-poesie.de/Weisse_Die_Zufriedenheit/index.htm. *La komponisto Wolfgang Amadeus Mozart verkis melodion por tiu ĉi poemo. Tiu estas aŭdebla en* https://www.youtube.com/watch?v=tS9cwRmxn0s.
*Tiu ĉi poemo estas trovebla ankaŭ en* http://www.gedichte-lyrik-poesie.de/Weisse_Die_Zufriedenheit/index.htm.